

# juna. amiko

93/3

Somerfina  
simfonio

Florbukedo  
laŭ

sud-hungara  
stilo

Internacia  
Kvaronjara  
Lernejana  
Esperanto-  
Revuo



Internacia  
Ligo de  
Esperantistaj  
Instruistoj

# ilei

Numero 66

**S**omero estas por naĝi, migri, ripozi. Ankaŭ por kunesti. La esperantistoj ŝatas kunesti kaj la plimulto de iliaj kunvenoj okazas en la someraj ferioj. Pluraj el tiuj aranĝoj estas por junuloj. Ĉar ĵus finiĝis somero en la norda hemisfero, ni parolu pri kelkaj el tiuj renkontiĝoj.

Unue, okazis la 28a Infana Kongreseto en Alborache, samtempe kun la Universala Kongreso en Valencio, marborde en Hispanio. La Kongreseto akceptas infanojn inter 6- kaj 13-jaraj, kiuj bone regas Esperanton. Tiel, tutaj familioj povis vivi dum semajno en Esperantujo, ĉiu en etoso kaj kun programo konvena al la aĝo. Ĉi-jare venis aparte multaj infanoj — 56 el 14 landoj. Ili preparis belan memorlibreton kun multaj fotoj — ni prezentos kelkajn raportajn liniojn el ĝi.

Tuj poste sekvis en Valencio la 2a Gimnazio de ILEI, por 13–16-jaruloj. Ankaŭ ĝi paralelis alian aranĝon, la 27an Konferencon de ILEI. Pri la Gimnazio ni raportos.

Ĉefe por junuloj inter 15 kaj 25 estis la IJS en suda Hungario kaj tuj post ĝi la IJK en Vraca, Bulgario. Pluraj bravuloj partoprenis ambaŭ spite landlimajn obstaklojn. Intima aranĝo por homoj ĉiuaĝaj estas la Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF), ĉi-jare en Sümeg, Hungario.

Certe aliaj renkontiĝoj okazis — se ni ricevos raportojn, ankaŭ pri tiuj ni povos raporti!

Sur la paĝo ok ni prezentas poemon kun titolo 'Somero'. Por nord-hemisferanoj ĝi revoku memorojn,

por sud-hemisferanoj ĝi veku atendojn.

Kie ajn vi loĝas — norde, sude — someron konservu en la koro!

*Stefan MacGill*  
15 sept. 1993.

**Juna amiko**, internacia revuo por lernejanaj kaj komencantoj. Eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

**Aperas kvarfoje jare:**  
februare, aprilo, septembro, novembro.

**Redaktoro:** Stefan MacGill.  
**Vic-redaktoro:** Esperantina Mirska

**Adreso de la redakcio:** pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario. ISSN 0230-1318

**Abonprezo:** Internacie ĉe UEA: 16,00 NLG. Ĉe la kasisto de ILEI 50 SEK (B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio, pĝk. 682117-7 (Stokholmo). En Hungario: 160 HUF (donacabono por eksterlandano 300 ft.) ĉe la Hungara ILEI-sekcio: M. Kovács, Ady Endre u. 23-25c, H-1221 Budapeŝt. Perantoj en 30 landoj; multaj ofertas nacivalutajn abonkotizojn. Reformeŭropaj landoj 300 HUF. Grandaj rabatoj (ĝis 50%) por kvantaj mendoj.

**Anoncoj:**

Kvaronpaĝo: 400 HUF  
enlande aŭ 40 NLG aŭ 4 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 600 HUF aŭ  
60 NLG. aŭ 6 jarabonoj.

Tuta paĝo: 800 HUF aŭ  
80 NLG. aŭ 8 jarabonoj.




## Frago

Sub arbedo  
de kratago,  
en aprila  
suna tago,  
kiel neĝo  
floras frago.



Kaj komence  
de somero  
bonodoras  
reĝa bero  
de matura  
dolĉa frago  
sur arbedo  
de kratago.



*Radojica Petrovic, Serbio*

## Mia ĉevalo.


Mia ĉevalo – brialanta, bruna,  
mi kun ĝi ŝatas restadi kune  
ĉar ni amikoj tre grandaj estas  
kiam mi foras – ĉeval' protestas  
kaj mi foresti longe ne ŝatas,  
ni ambaŭ ege amike fratas.

Se mi parolas, ĉeval' komprenas  
kaj en respondo specife mienas  
aŭ voste ŝvingas tre, tre komprene  
kiam ĝu-mangas li frumatene.

Ho! Kungalopi ĉefe ni ŝatas  
ĉar ni treege amike fratas;  
tiam ni ĝojas tre, tre ni ĝuas  
kiam kurblovo ambaŭ nin skuas!

\* \* \* \*

Sed... mi vekigis,  
jam igis tago...  
...mia ĉevalo... en song-imago!!!




*Romuald SKALIN'SKI, Pollando*

# Infana Kongreseto — varma kaj granda!

Somere mi partoprenis la internacian infanan kongreseton en Hispanio. Tie estis sesdek partoprenantoj el 15 landoj: el Francio, Hungario, Britio, Hispanio, Litovio, Germanio, Usono, Rusio, Irlando, Belgio, Kroatio, Japanio kaj Pollando. Tie mi konis jam multajn infanojn, sed mi ankaŭ konatiĝis kun multaj. Ni ĉiutage preparis taglibron, faris kantadon, naĝadon, ludadon, grupajn agadojn, ludojn kaj ankoraŭ multegajn aferojn.

Ni loĝis en tre bela junulara gasetejo, kie surloke estis naĝbaseno kun malgrandaj palm-arboj. Ni naĝis dufoje tage! Ni havis du grandajn ekskursojn:

- 1) Ni iris al grandega akvofalo kaj ni eĉ naĝis.
- 2) Ni vizitis fontanon en Valencio, kie ni kantis kaj oni intervjuis kelkajn infanojn.



Poste ni iris al la granda kongresejo kaj tie ni kantis kaj dancis. Tie oni intervjuis min. Entute tri-foje oni intervjuis min, unufoje la ĵurnalistoj, unufoje la televidistoj kaj unufoje la radiistoj. Do, estis tre bone!

Tiu ĉi renkontiĝo bedaŭrinde daŭris nun unu semajnon. Ni venontjare ne intencas iri al Seŭlo, sed post du jaroj ni eble iros al Tampere, alia internacia renkontiĝo.

## Internacie, ankaŭ en hejmlando!

Post la infana kongreseto ni revenis hejmen al Budapeŝto. Ni pasigis unu tagon hejme kaj poste ni iris al Sümeg, kiu troviĝas en Hungario. Tie okazis familia renkontiĝo kiel ĉiujare. Ankaŭ tie kunvenis homoj el multaj landoj: de Svisio, Hungario, Belgio, Italio, Kroatio ktp. Ni vizitis la grandan fortikaĵon de Sümeg supre de monto kaj ankaŭ la kanfabrikon. Tie ni ludis, kantis ktp.

Alian tagon ni komune ĉeval-rajdadis. Partoprenis Michael Maitzen, "Miĉjo" el Aŭstrio, kiu estas astronomo kaj li parolis pri steloj. Iun nokton ni rigardis la falantajn stelojn, iuj eĉ dormis ekstere. Estis tre bela vidindaĵo. Ankaŭ ĉi tiu renkontiĝo estis unu-semajna. Eble venontjare okazos en Kroatio kaj tion organizos Pajo Tišljar. Do, ĉiuj renkontiĝoj plaĉis al mi pleje!

*Anita Besenyei, Hungario*

## Al groto, maro

Ekskursoj de la infana kongreseto: Teksto el la kongreseta libro.

Dum la Infana Kongreseto estas kutime du ekskursoj: unu tuttaga kaj unu duontaga. Tiun ĉi oni kutime faras piede, kaj ĉar ĉi-jare ni kongresis en tre varma lando ni decidis fari frumatenan ekskurson al bela groto. Laŭnature ĝi estis tre belsa, sed ŝokis nin dum prepara vizito la kvanto da rubaĵoj: kelkaj el ni do decidis kunporti plastajn sakojn kaj postlasi du-lingvan afiŝon kun la vortoj 'Konservu pure nian groton!' Tiam ni naĝis, matenmanĝis, grimpis kaj bone amuziĝis.

La tut-taga ekskurso estis tre varia. Ni iris unue al la malnova parto de Valencio, kie, ĉiuj en identaj belaj T-ĉemizoj kaj ĉapoj, kiujn ni ricevis donace, kaj kiuj portis Esperantajn vortojn, ni kantis por la publiko kaj televido.

Tempon por viziti la turegon kaj katedralon ni bedaŭrinde ne havis antaŭ ol iri al la UK-ejo, sed ĉiu infano ricevis donaceton de bombonoj el la strato Conde de Trenor. Ĉe la kongresejo ni denove kantis akompanite de niaj instrumentoj, eĉ violonĉelo, kaj ekster kaj en tiu Palaco de Muziko.

Mondonacoj de helpemaj UK-anoj pagis la vojaĝ-kostojn de knabo, kiu ne povus ĉeesti sen tia helpo.

Je tiu momento estis tre varme ekster la Kongresejo, sed ni ĝuis piknikon en la 'eks-rivero' antaŭ ol busumi al marbordo El Saler. Tie la vento kaj la ondoj surprizis multajn, sed ne malpermesis eĉ al la plej malgrandaj tre ĝuidan horon.

Tiam al Cheste, urbeto fama en Esperantujo pro grupo de samideanoj kun infanoj, kiuj fuĝis tien dum la Unua Mondmilito. Kun intereso ni vizitis la straton *Calle de Zamenhof* kaj la domon de fama loka esperantisto.

Ĉe la urbodomo la urbestro tre amike bonvenigis nin kaj donacis T-ĉemizojn. Sekvis ankaŭ donace, en la sportejo de Cheste, sandviĉoj kaj glaciaĵoj. Multaj tiam denove naĝis antaŭ nia reveno al Alborache.

Elkoran dankon, Jozefo Anó, pro ĉio kion vi faris por certigi sukces-plenan tagon!



*La kongreseta libreto prezentas la supran tekston kun multaj belaj fotoj, kiujn ni bedaŭrinde ne povas reprodukti. Kiu volas ekscii pli pri la infanaj kongresetoj, petu ĉu ankoraŭ aĉeteblas la libreto. Ĉiuokaze informojn donas: Kristoforo Fettes, St. Columba's College, Dublin 16, Irlando.*

# MILITAJ LUDOJ

ARANĜIS:  
Stefan Mac Gill  
DESEGNIS:  
Pavel Rak

NI LUDU MILITOJN!

BONE!

DO MI ESTOS LA SENTIMA  
HEROO, LA DEFENDANTO  
DE LIBERECO KAJ  
DEMOKRATIO!

KAJ VI ESTU LA  
PERFIDE SENDIA  
DIKTATURA  
SUBTREMANTO.

HMM

KIUN ONI TAFAS PER  
SAGO, DEVAS MORTI  
KAJ GAJNAS LA  
ALIA FLANKO

KOMPRENITE

EK!

TŬOK

ZIFF!

IOM STULTA  
LUDO, ĈU NE?



# La hundoj de Bahloo

(Aŭstralia aborigena folkloro)


Iun nokton Bahloo, la Luno-Viro rigardis malsupren je la mondo. Li ekbrilis tre forte por vidi per sia lumo ĉu io moviĝas ĉirkaŭ la mondo. Ofte, dum la estaĵoj de la mondo dormis, la Luno-Viro vizitis la teron por ludi kun siaj tri hundoj. Laŭ la Luno-Viro ili estas hundoj sed la aborigenoj kredis, ke ili ne estas hundoj sed serpentoj — bruna serpento, nigra serpento kaj bunta serpento.

Iufoje Bahloo vidis aron da aborigenoj transirantaj rivereton. Li kriis al ili: "Haltu, mi deziras, ke vi portu miajn hundojn trans la rivereton". Kvan-kam la aborigenoj havis multan simpaton por la Luno-Viro, ili timegis terure liajn venenajn serpentojn. Multaj el la aborigenoj mortis pro venenaj morderoj de la serpentoj. La aborigenoj respondis: "Bahloo, ni ne portos viajn hundojn trans la rivereton ĉar ni timegas ke iliaj venenaj morderoj mortigos nin. Viaj hundoj ne similas al niaj, kies morderoj ne estas por ni danĝeraj."

Bahloo plue diris: "Se vi plenumos mian peton, post la morto vi reakiros la teran vivon". Bahloo prenis peceton da arboŝelo kaj ĵetis ĝin en la rivereton: "Rigardu la arboŝelon — ĝi leviĝas tuj al la akvosupraĵo kaj flosas trankvile kaj senĝene. Portu miajn hundojn trans la rivereton kaj same kiel la arboŝelo vi releviĝos post la morto. Sed se vi ne portos miajn hundojn trans la rivereton, post la morto vi ne reviviĝos."

Bahloo ĵetis ŝtonon en la akvon. Ĝi tuj sinkis ĝis la fundo de la rivereto. "Jen vi estos kiel ĉi tiu ŝtono sur la rivera fundo." diris Bahloo. La aborigenoj ekstremis pro la timo kaj diris: "Ni ne povas helpi vin, Bahloo, ĉar ni tro timas viajn hundojn".

Post nelonge la Luno-Viro venis al la mondo por porti siajn hundojn trans la rivereton. Li ree ekvidis la aborigenojn kaj diris: "Miaj hundoj ne estas danĝeraj por vi, portu ilin!" La aborigenoj refoje rifuzis plenumi la peton de Bahloo. Do



finfine kun la nigra serpento volvita ĉirkaŭ la dekstra brako, kun la bruna ĉirkaŭ la malddekstra brako kaj kun la bunta ĉirkaŭ la kolo, Bahloo transiris la rivereton. Tuj poste li prenis

la ŝtonon kaj jetante ĝin en la akvon li diris: "Malkuraĝuloj! Poltronoj! Vi neniam ĝuos la eternan vivon! Same kiel la ŝtono sur la rivera fundo vi estiĝos parto de la grundo ĉar vi rifuzis porti miajn hundojn. Ve al vi! Post la morto eĉ viaj ostoj forputros!"

La Luno-Viro kolere mienis kaj la serpentoj siblis furioze. La aborigenoj trankviliĝis nur post kiam Bahloo kun la serpentoj malaperis en veprejo.

Ekde tiu evento la aborigenoj treege timas serpentojn kaj strebas mortigi ilin. Sed la Luno-Viro sendas ĉiam en la mondon novajn serpentojn flustrante: "Dum ekzistos aborigenoj ankaŭ ekzistos serpentoj por memoriĝi pri tio, ke antaŭ longa, longa tempo la aborigenoj rifuzis mian peton."


*W. kaj R. Robinson  
Melburno, Aŭstralio.*

### Vortklarigoj:

Bahloo: aborigena vorto: la luno  
aborigeno: aŭstralia indiĝeno  
venena: toksa, malsaniga  
sibli: eligi longdaŭran 's'-sonon  
veprejo: loko, kie kreskas sovaĝaj  
arbustoj kaj arbedoj

## Somere

Bonan tagon hundeto, saluton!  
Bone, ke jam revenis mateno.  
Suno vagas en ora gajeco  
kaj ni baldaŭ komencos promenon.



Varma vento eniras al ĉambro,  
nia strato ĉirpas kun paseroj;  
ĉiuj ĝoje florantaj tilioj  
estas kvazaŭ aroma somero.

Vi petolos kun laŭta bojado  
kaj mi manĝos fruktan glaciaĵon.  
Poste venos aliaj plezuroj  
kaj aliaj feritravivaĵoj.

*Halina Kuropatnicka-Salamon, Pollando*



# Arboj kaj birdoj ankaŭ ne plu ekzistas

Infanoj skribas pri sia estonteco

Eldonita germanlingve de: Margitta Meinerzhagen.

Eldonejo: Rasch kaj Rohring, Hamburgo.

*Selektis kaj sendis la tekstojn laŭ speciala permeso de la eldonejo: Nora Caragea, Frankfurto. Originala titolo: Bäume und Vögel gibt es auch nicht mehr – Kinder schreiben über ihre Zukunft.*


## La mondo tre ŝanĝiĝis.

Ĝi ne plu estas tia, kia ĝi estis iam en mia infaneco. La arbojn oni konsideras mortintaj, estas entute miraklo, ke ekzistas ankoraŭ io vivanta. La arboj devas esti anstataŭigitaj per grandegaj generatoroj, kiuj iomete — sed vere nur iomete — filtras la aeron. La esploristoj esploras kaj cerbumas, kial la medio estas detruita. Kial do? Tiun ĉi demandon mi povas respondi al mi mem. Tute simple. Ĉar la homo estas tro pigra por maldanĝerigi venenajn acidaĵojn, ili estas simple ĵetataj en la medion. Tamen ne ĉiu homo estas tiel kruela. Malmultaj klopodas kaj protektas tion, kion ni ankoraŭ posedas de la naturo. Sed tiuj malmultaj homoj ne sufiĉas, ĉiuj devas helpi.

Sed kiu ja zorgas pri tio? Ili ĉiuj ja sidas en siaj brakseĝoj, manĝaĉas kaj gapas televidon aŭ igas la komputilon kalkuli, kiom da riĉaĵoj ili posedas. En la fabrikoj ĉio estas stirata de komputiloj. Manlaboron oni eĉ ne plu konas. Antaŭ nelonge mia filo Teo demandis min: "Panjo, kio estas manlaboro"? Tiam mi rakontis al li, kiel estis en mia infanaĝo. Post tio li foriris mediteme en sian ĉambron. Vespere mi volis diri al li bonan nokton. Kaj tion mi ankaŭ faris. Kiam mi foriris el lia ĉambro, mallaŭte li diris al mi: "Panjo mi volas, ke oni povu retroturni la tempon". Iomete flatita ankaŭ mi tiam enlitigis. La postan tagon ni iris al la subtegmentejoj kaj traserĉis miajn malnovajn objektojn. Li flustris ion al mia orelo. Mi estis ege entuziasmigita pri tio.

Dum la sekvaj semajnoj ni laboradis multege. Je la naskiĝtago de Teo ĝi estis preta: mia iama infanĉambro. Ni rekonstruis ĝin tia, kiam mi ĝin rememoris. Teo estis tiom feliĉa, kiel neniam antaŭe mi vidis lin. Mi supozas, ke Teo kaj la aliaj infanoj sopiris utiligi sian fantazion. Kaj tio baldaŭ montriĝis prava. Ĉiuj infanoj venintaj al Teo estis ravitaj. Ili konstruis belegajn kastelejojn per kubo kaj kubetoj.

*12-jara knabino, Nurlingen, Germanio*



## Mondo de egoistoj.

Saluton mia taglibro! Hodiaŭ estis mia naskiĝtago, mi iĝis tridek jara. Iel mi sopiras al la festoj de naskiĝtago el iama tempo! Nuntempe neniu homo pensas pri la aliaj. Kiel eble plej rapide ĉiuj volas atingi altan pozicion en la profesia vivo kaj gajni multe da mono. Kunsentoj, amo, iomete da karesemo – ĉio tio malaperas; kial do?

Iam mi imagis mian vivon tiel bela. Mi intencis esti apoteka asistantino, deziris edziniĝi, aĉeti dometon inter verdaĵoj kaj posedi kelkajn bestojn! Sed kiel utilas al mi tiaj revoj? Ĉio estas industriigita, kaj per tio estiĝis ankaŭ kelkaj laborlokoj – ĉe la ruliĝanta stablo. Tie mi sidas nun, tagon post tago la tutsamaj monotonaj movoj. Forpasadas la horoj, tagoj, monatoj. Se oni havas nenion, tiam oni estas neniu, tiam oni ankaŭ iĝas neniu. Ĉio, kio efektiviĝis el miaj revoj pri la dometo inter verdaĵoj, estas tio: etaĝa loĝejo en la oka etaĝo de multifamilia domo.


Kelkfoje mi deziras, ke mi povu komenci ankoraŭfoje de la komenco. Sed sola mi povas atingi nenion! Se pli da homoj meditados pri sia estonteco! Sube sur la strato mi povas rekoni ilin, preterhastantaj, nepre esti pli rapidaj ol la aliaj, por antaŭ ili atingi specialan oferton en iu vendejo. Nur tio estas grava por ili. Foje mi satus scii, ĉu mi estas sola kun mia opinio aŭ ĉu ekzistas ankoraŭ aliaj homoj pensantaj kiel mi. Sed mi kredas, tamen, ne! Tiu ĉi mondo estas mondo de egoistoj, kiuj nur zorgas pri si mem! Neniu el ili konstatas, kiel bele povus esti, se ĉiuj agadus kune. Sed kiam la homoj ne kapblas konfesi al si mem siajn erarojn, ekzistas nenia espero, ke oni oferu eĉ nur ideon pri tio.

Morgaŭ estos nova tago, mi havos unu jaron pli, sed nenio ŝanĝiĝos, aŭ tamen, jes?

*13-jara knabino, Holzwickede, Germanio.*

## Nuntempo kaj estinteco.

Ĉe la tablo sidis viro kaj matenmanĝis. Dume li legis supraĵe la gazeton, kiu etendiĝis antaŭ li. Tie estis en grandaj literoj sur la unua paĝo: 'Cisternŝipo akcidentiĝis! Hieraŭ akcidentiĝis la franca cisternŝipo *Dominique*, kiu estis ŝargita per 15.000 tunoj da petrolo kaj estis survoje de Francio al Germanio, pro kolizio kun la germana varŝipo *Hannibal*.'



”Jam denove!” la viro kolere kriis, dum li forĵetis la gazeton. La 42-jarulo tiam pensis, kiel estis, kiam antaŭ 30 jaroj li estis 12-jara knabo. Tie, kie sur la alia stratflanko troviĝas nun fabriko, estis arbareto dum lia infanaĝo. Tie li ludis preskaŭ ĉiutage. Sed tio estis rememoroj. Hodiaŭ nur malofte oni vidas arbaron.

”Arbaron”, laŭte pensis la viro: ”Arbaron mi ŝatus vidi iam denove”. Post mallonga tempo li sidis en sia aŭtomobilo kaj startis. Li preterveturis butikojn, vendejojn por komputiloj, grandmagazenojn kaj fabrikojn. Li volis fuĝi el tiu fumnebulaĵo, nomata urbo. Sole for. Post preskaŭ du horoj li haltis antaŭ belega arbaro. Li forlasis la aŭtomobilon kaj kiel infano li ĝojis pri la naturo. Li vidis la arbojn, la fungojn, la birdojn kaj ankoraŭ multe pli.

Horoj pasis, kiam subite li ekatentis. Ĉu proksime ne estis ia brueto? Jen — denove ĝi estis aŭdebla. La viro sekvis la bruon, ĝis li renkontis grupon da laboristoj. Li balbutis: ”Kion vi ja faras ĉi tie?”

”Ni laboras ĉi tie por *Irma-konservoj* kaj ni devas senarbigi tiun ĉi teron. Kaj nun foriru!” respondis al li malafabla voĉo.

Ne dirante eĉ unu vorton la viro foriris. Li demandis al si, ĉu la homoj neniam saĝiĝos? Ili nek volas nek kapablas kompreni, ke oni ne povas vivi sen naturo. Ĉiam ili nur strebas al mono kaj profito. Jes, la mono faras ilin tiel malsanaj, ke ili ne plu povas distingi inter ŝajno kaj realeco. Ili parolas pri kampanjoj por la naturo, sed tamen ili detruas ĝin pli kaj pli. Sed monon oni ne povas manĝi! Oni ankaŭ ne povas ĝin trinki aŭ spiri! Ĝi ankaŭ nek varmigas nek protektas. ”Fakte, mono estas senvalora” la viro diris al si mem kun larmoj sur la vizaĝo. Li denove enaŭtigis kaj ekveturis. De malproksime li aŭdis ankoraŭ la segilojn kaj la falantaŭn arbojn. Alveninte hejmen li tuj enlitiĝis, ĉar estis jam malfrue.

La sekvan matenon revenis la ĉiutagaĵo. Estis lundo. La viro estis bonŝanca, ĉar li trovis laboron kiel inĝeniero, efektive nuntempe, en la jaro 2017, plej multon de la laboro prizorgas la komputiloj. Vespere li revenis hejmen. Li ne volis rigardi televidon, ĉar li ja sciis, ke en la novaĵoj oni raportas denove pri iaj katastrofoj. Malĝoja li enlitiĝis kaj demandis al si, kiom longe ankoraŭ ekzistos tiu ĉi mondo.

*12-jara knabo, Velbert, Germanio.*

\* \* \* \* \*

*Jen la dua kolekto de tekstoj pri la estonteco verkitaj de junuloj. Kion vi opinias pri la estonta vivo sur nia tero? Kiaj estos niaj urboj, niaj lernejoj, niaj fabrikoj, niaj hejmoj, niaj familioj post dek jaroj — post dudek aŭ tridek? Ĉu vi estas pli optimisma aŭ pesimisma?*

*Verku por ni similan rakonton! La plej bonajn ni aperigos kaj rekompensos.*

## Sama prezo por Juna amiko en okcidento por 1994.

Ni ĝojas anonci, ke la ĉefa internacia tarifo por nia gazeto en nederlandaj guldenoj povos resti senŝa nĝa por 1994. Tio signifos, ke la abono en preskaŭ ĉiuj aliaj okcidentaj valutoj restos same senŝanĝa. Same ankaŭ por la landoj de Latin-ameriko kaj Azio.

La solaj lokoj, kie ni devas iom altigi la abonon estas por Hungario mem kaj ĝiaj reform-eŭropaj najbaroj, kie inflacio kaj malplivalorigoj de la valutoj daŭre plagas nin, kaj kie niaj kostoj daŭre altiĝas. Ni fiksas tie la abonon en nur kelkaj el la regionaj valutoj. La ceteraj pagu la momentan ekvivalenton de la forinta aŭ dolara kotizo indikita. La suba tabelo prezentas tion.

Memoru, ke *Juna amiko* ne estas simila al la plimulto de gazetoj. Plejofte al unu homo aŭ adreso oni sendas nur unu ekzempleron, kaj tion legas unu, du, tri aŭ kelkaj homoj. Sed *Juna amiko* estas por klasaj grupoj, por komuna legado kaj studado. Do, ni volas kuraĝigi vin mendi unu ekzempleron por ĉiu en via grupo. Tial ni ofertas grandajn rabatojn ĝis 50% por kvantaj mendoj.

LANDOJ	1 ABONO	2-5 ABONOJ	EKDE 6 ABONOJ	EKDE 25 ABONOJ
Okcident-eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio, Aŭstralazio.	16 NLG 9 USD 60 SEK ktp.	12 NLG 7 USD 50 SEK	10 NLG 6 USD 40 SEK	8 GLD 5 USD 35 SEK
Latin-ameriko, Israelo, Koreio.	10 NLG	8 NLG	7 NLG	5 NLG
Bulgario, Rusio, Pollando, Baltio.	350 HUF	300 HUF	250 HUF	200 HUF
Najbarlandoj de Hungario:	250 HUF	210 HUF	180 HUF	150 HUF
Hungario	200 HUF	160 HUF	140 HUF	100 HUF

Sur sekvaj paĝoj vi trovos la precizajn adresojn de niaj perantoj, ofte kun la abonkotizo en nacia valuto. Se ne, vi bv. pagi la guldenan aŭ forintan ekvivalenton indikitan supre en la tabelo.

Ni ne verkis apartan perantan cirkuleron ĉi-jare, sed jam informis la ĉefajn perantojn pri la novaj kotizoj. Se peranto havas demandon aŭ dubon, tiu bv. turni sin al la redakcia adreso. Ni kalkulas je multaj abonoj!

# VORTLISTO POR JUNA AMIKO (1993)

Jam de la komenco *Juna amiko* estis verkita per limigita vort-trezoro — oni uzadis liston de 667 radikoj. Se artikolo uzis vorton ekster tiu listo, ĝi ricevis numeron kaj klarigon sube de la paĝo. Ni nun reviziis tiun liston kaj kreis liston kun ĉ. 950 radikoj kaj afiksoj. La listo ne inkluzivas proprajn nomojn, landnomojn ktp. Ni esperas, ke ĝi utilis al niaj verkantoj kaj legantoj.

Ni indikas du-ligajn (transitiva jn verbojn) per -N. (ekz. Mi skribas leteron.) Kompreneble, iuj du-ligaj verboj estas uzeblej absolute (ekz. Kion vi faras? Mi skribas! — ĉar en tiu momento, ne gravas kioN vi skribas). Tamen, ili restas du-ligaj verboj.

Verbo ofte uzata antaŭ alia (infinitiva) estas signita per (i), ekz. Mi volas iri.


Iuj verboj kaj vortoj estas kutime uzataj kun difinitaj prepozicioj. Tiujn ni indikas *kursive*. Kelkfoje vi povas uzi prepozicion anstataŭ la -N (ekz. 'Mi helpos viN' aŭ 'Mi helpos al vi.') Alifojne ni uzas la prepozicion aldone al la unua aŭ dua ligo, ekz. 'Mi donas tion al vi.'

Aliaj similaj listoj aperis por la Zagreba metodo kaj la revuo *Kontakto*. Komentoj pri la listo bonvenas; baldaŭ ni ekuzos literum-kontroilon por aŭtomate signali eksterlistajn vortojn!

-aĉ-	anstataŭ	bani -N	buŝo	<i>al, pro, per</i>
aĉeti -N	-ant-	banko	butero	dato
-ad-	antaŭ	barelo	butiko	daŭri
admiri -N	aparta	barilo		de
adreso	aparteni <i>al</i>	batali <i>kun, per,</i>	celo	decembro
aero	apenaŭ	bati -N	cent	decidi <i>pri (-i)</i>
afabla	aperi	bela	centro	dek
afero	apetito	bedaŭri -N	certa	dekstra
afiŝo	aprilo	benko	cigaredo	demandi -N,
agi	apud	besto	cetera	<i>al, pri</i>
agrabla	aranĝi -N	bezoni -N	citrono	dento
aĝo	arbo	biciklo		dependi <i>de</i>
ajni	arĝenta	bildo	ĉambro	desegni -N
-aj-	-ar-	bileto	ĉapelo	devi (i)
akcidento	-as	birdo	ĉar	deziri -N (i)
akcepti -N	asocio	biskvito	ĉarma	diablo
akiri -N	aspekti	blanka	ĉe	dika
akompani -N	-at-	blovi	ĉefa	diligenta
akra	arto	blua	ĉemizo	dimanĉo
aktiva	atendi -N	bo-	ĉesi	dio
akvo	atēnti -N	boatō	ĉevalo	direkto
al	atingi -N	bona	ĉi	diri -N <i>al, pri, ke</i>
alfabeto	aŭ	bordo	ĉia	dis-
alia	aŭdi -N	botelo	ĉiam	diskuti -N
almenaŭ	aŭgusto	boto	ĉie	<i>pri, kun</i>
alta	aŭskulti -N	bovo	ĉielo	distanco
amaso	aŭto	brako	ĉio	diveni -N
ambaŭ	aŭtuno	brili	ĉirkaŭ	diversa
ami -N	aventuro	brui	ĉiu	do
amiko	aviadilo	bruli	-ĉj-	dolĉa
amuzi -N	avo	bruna	ĉokolado	doloro
angulo	azeno	brusto	ĉu	domaĝo
animo		bufedo		domo
ankaŭ	babili <i>pri, kun</i>	bukedo	da	donaco
ankoraŭ	balai -N	bulko	danci	doni -N, <i>al</i>
-an-	baldaŭ	buso	danĝera	dormi
	banano		danki -N,	

dorso	fi-	griza	- int-	kia
du	fidela	grupo	intenci (i)	kial
dubi <i>pri</i>	fiksi -N	gusto	inter	kiam
dum	filo	guto	interesi -N	kie
eble	fingero	gvidi -N	interna	kiel
-ec-	fini -N	ĝardeno	interpreti -N	kies
eĉ	fiŝo	ĝeni -N	inviti -N <i>al, por</i>	kino
edzo	flago	ĝenerala	io	kiom
efektiva	flanko	ĝentila	iom	kisi -N
efiki	flava	ĝi	iri	kisi -N
-eg-	floro	ĝi	- is	kiu
egala	flug <i>al, per,</i>	ĝis	- ism-	klara
-ej-	flui	ĝoji <i>pro, pri</i>	- ist-	klaso
ek-	fojo	ĝui -N	iu	klini -N
ek-	folio	ĝusta	ja	klopodi (i)
ek-	fondi -N	halti	jam	klubo
ekskurso	fonto	haro	januaro	knabo
ekster	for	havi -N	jaro	koko
ekzemplo	forgesi -N <i>pri (i)</i>	haveno	ĵe	kolbaso
ekzerco	forko	hejmo	ĵen	kolekti -N
ekzisti	formo	hela	ĵes	koleri <i>pri, pro</i>
el	forta	helpi -N <i>al, per</i>	juĝi -N <i>pri</i>	kolo
elekti -N	frapi -N <i>per,</i>	herbo	juna	kolombo
-em-	<i>sur, al, kontraŭ</i>	hierao	junio	koloro
en	frato	historio	julio	kombi -N
-end-	fraŭlo	ho!	jupo	komo
enui	frazo	hobio	justa	komenci
epoko	fremda	hodiaŭ	ĵaŭdo	komerci
-er-	freŝa	homo	ĵeti -N <i>al, sur,</i>	kompati -N
erari	frua	honesta	<i>en, tra,</i>	kompreni -N
esperi -N <i>je, ke</i>	frukto	honti <i>pri, pro (i)</i>	ĵus	komuna
esti	fumo	horloĝo	kafo	kondiĉo
estimi -N	fundo	horo	kaj	konduki -N <i>al</i>
estro	gaja	hundo	kajero	koni -N
-et-	gajni -N	ia	kalendaro	konsenti <i>pri</i>
etaĝo	gardi -N	iam	kalkuli -N	konservi -N
fabelo	gasto	ideo	kampo	konsili -N <i>al</i>
fabriko	gazeto	ie	kanti -N <i>al, pri</i>	konsisti <i>el</i>
facila	ge-	-ig- -N	kapabla	konstrui -N
fajfi	genuo	-iĝ-	kapo	kontenta <i>pri</i>
fajro	glacio	ili	kontraŭ	kontraŭ
fali <i>de, en, sur</i>	glaso	-il-	konversacio	korbo
fama	gluti -N	imagi -N	koro	koro
familio	grado	inda	korekti -N	korpo
fari -N	gramatiko	infano	korespondi <i>kun</i>	korto
farti	granda	informi -N <i>pri</i>	kosti	kovri -N <i>per</i>
februaro	gratuli <i>al, pro</i>	inko	koverta	krajono
feliĉa	grava	-in-	kelka	kredi -N <i>al, je, pri</i>
fenestro	graveda	insekto	kelo	
ferioj	greno	insigno	kesto	
fermi -N	grimpi -N <i>al,</i>	instrui -N <i>al, pri</i>		
fero	<i>sur, de</i>	insulo		
festo				

# FABELA MONDO



## MIAJ LUDILOJ

ĜIRAFO ESTAS LONGAKOLA,  
KATETO LERTA KAJ KAĴOLA,  
HUNDO AMIKO TRE FIDELA,  
URSETO MOLA KAJ TRE BELA.

## FRANDA URBETO

Post la kamparo,  
Post la arbaro,  
Staras urbeto  
Sur la omleto.  
Tieaj domoj  
Estas el pomoj,  
Ĉiuj tegmentoj  
El la krescentoj,  
Ĉiuj kupoloj  
El ravioloj.  
La domaj kortoj  
Estas el tortoj,  
Ĝarden-bariloj  
El la daktiloj,  
Kurtaj stratetoj  
El la spagetoj,  
Kamparaj padoj  
El ĉokoladoj  
Kaj la ŝoseoj  
El la ĵeleoj.



Fluas rivero  
El la sukero,  
Staras kabano  
El sukerkano.  
Estas en urbo  
Mont' el kukurbo,  
Vivas urbanoj  
El marcipanoj.  
Vi ege miras.  
Ĉu vi deziras  
Vidi urbeton?  
Manĝu omleton,  
En liton plongu,  
Pri urbo songu.



# HORLOÇO

**TIK-TAK, TIK-TAK,  
ELLITIÒI ENDAS!  
TIK-TAK, TIK-TAK,  
LUDILOJ ATENDAS.  
TIK-TAK, TIK-TAK,  
JAM MALFRUE - VIDU!  
TIK-TAK, TIK-TAK  
RAPIDU, RAPIDU!**



krei -N	lingvo	momento	obla	per
kreski	linio	monato	observi -N	perdi -N
krii	lito	mono	ofico	permesi <i>al (i)</i>
krom	litero	mondo	ofta	persono
kruco	logi	monto	ok	peti -N <i>pri, de</i>
kudri -N	loĝi <i>en</i>	montri -N	okazi <i>al</i>	peza
kuiiri -N	loko	morgaŭ	okcidento	piezo
kuko	longa	morti	oktobro	pilko
kulero	ludi <i>per, kun</i>	movi -N	okulo	piro
kulpa	lumi	multa	okupi -N	placo
kun	lundo	muro	ol	plaĉi <i>al</i>
kuraci -N	luno	muso	ombro	plafono
kuraĝa		muŝo	ombrelo	plano
kuri <i>al, de</i>	magazeno	muzelo	-on-	planko
kurso	majo	muziko	ondo	planto
kuŝi	mal-		oni	plej
kutimo	malantaŭ	nacio	onklo	plena
kuzo	malgraŭ	naĝi <i>al, de</i>	-op-	plendi <i>pri, pro</i>
kvankam	manĝi -N	najbaro	opinii -N <i>ke, pri</i>	plezuro
kvar	maniero	najlo	oranĝo	pli
kvazaŭ	manki <i>al</i>	naski -N	ordinara	plori <i>pro</i>
kvereli <i>kun</i>	mano	natur	ordo	plu
kvin	mantelo	naŭ	ordoni -N <i>al</i>	plus
	marko	nazo	orelo	plumo
la	maro	ne	organizi -N	pluvo
labori	mardo	nebulo	oriento	pomo
laca	marŝi	necesa	oro	ponto
lago	martelo	neĝo	ovo	popolo
lakto	maro	nek		por
lampo	mastro	nenia	paco	pordo
lando	maŝino	neniam	pacienco	porko
lango	mateno	nenie	pagi -N <i>al, per,</i>	porti -N
larĝa	meblo	nenio	<i>pro</i>	posedi -N
lasi -N	mem	neniu	paĝo	post
lasta	memori -N	nepo	paki -N	postuli -N
laŭ	merkredo	nepre	palo	poŝo
laŭdi -N	mendi -N	ni	pantalono	poŝto
laŭta	mensogi	-nj-	papero	povi (i)
lavi -N	meti -N	nigra	pardoni <i>al</i>	pra
leciono	mezo	nokto	paro	pravi
legi -N	mezuri -N	nombro	parko	precipe
leĝo	mi	nomo	paroli <i>pri, al, per,</i>	precize
lerni -N	mielo	nordo	<i>kun</i>	preferi -N <i>ol, al</i>
lerta	miksi -N	nova	parto	premi -N
letero	mil	novembro	pasi	preni -N
levi -N	militi <i>pro</i>	nu	paŝi	prepari -N
li	minuto	nubo	patro	preskaŭ
libera	miri <i>pro, pri</i>	nuda	paŭzo	preta
libro	mis-	nulo	peco	preter
ligi -N	moderna	numero	pendi	prezenti -N
ligno	modesta	nun	peni	prezo
ligo	moki -N	nur	pensi <i>pri</i>	pri
limo	mola		pentri -N	printempo
		objekto		

pro	ruĝa	spiegulo	taso	urĝa
problemo	ruli -N	spiri	taŭga	urso
produktu		spirito	tegmento	-us
profesio	sabato	sporto	teksto	utila
profunda	sablo	stacio	temo	uzi -N
proksima	saĝa	stari	tendo	
promeni	sako	stato	telero	vagono
promesi -N al	salajro	stelo	teni -N <i>per, en</i>	valizo
propa	salo	stranga	tero	valoro
provi -N (i)	salti	strato	teruro	vaporo
pruno	saluti -N	studi -N	tia	varma
prunti -N al	sama	sub	tial	vasta
punkto	sana	subita	tiam	veki -N
pura	sango	sudo	tie	vendi -N al
puŝi -N	sata	suferi -N <i>pro</i>	tiel	vendredo
	scienco	sufiĉa	timi <i>pri, pro</i>	veni
rabi -N	scii -N <i>pri, ke</i>	sukcesi (i)	tio	venki -N <i>en</i>
radio	se	sukero	tiom	vento
rado	sed	sumo	tiri -N	vera
rajdi -N <i>sur</i>	seĝo	suno	tiu	verda
rajto	seka	super	tondi -N <i>per</i>	verko
rakonti -N <i>pri, al</i>	sekundo	supo	tra	verŝi -N
rapida	sekvi -N	supro	traduki -N <i>de, al</i>	vespero
ravi -N	semajno	sur	trafi -N	vesto
razi -N	sen	surda	trafiko	vetero
re-	senco	surprizo	trajno	veturi <i>al, en,</i>
retro-	sendi -N		trakti -N	<i>per, kun</i>
regi	senti -N	ŝafo	tramo	vi
regiono	sep	ŝalo	tranĉi -N	viando
regulo	septembro	ŝajni <i>al, ke</i>	trankvila	vico
reĝo	serĉi -N	ŝanĝi -N <i>al</i>	trans	vidi -N
rekomendi -N <i>al</i>	serioza	ŝati -N	tre	vigla
rekta	serpento	ŝerci <i>pri</i>	tri	vilaĝo
religio	servi -N <i>al, per,</i>	ŝi	trinki -N	vino
renkonti -N	<i>kiel</i>	ŝiri -N	tro	vintro
respondi <i>al</i>	ses	ŝipo	trovi -N	viro
resti	sezono	ŝlosi -N	truo	viŝi -N <i>per</i>
revi <i>pri</i>	si	ŝranko	tubo	vitro
ricevi -N <i>de</i>	sidi	ŝtato	tuj	vivi
riĉa	signifi -N	ŝteli -N	tuko	vizaĝo
ridi <i>pro, pri</i>	ŝilenti	ŝtono	turni -N	viziti -N
rigardi -N	ŝimila <i>al</i>	ŝtrumpo	turo	voĉo
rilati <i>al</i>	ŝimpla	ŝtupo	tuŝi -N	vojaĝi <i>per,</i>
rimarki -N	ŝinĵoro	ŝuo	tuta	<i>al, kun, tra</i>
rimedo	ŝkribi -N	ŝultro		vojo
ripeti -N	sola	ŝviti <i>pro, super</i>	-uj-	voki -N
ripozi	soldato		-ul-	voli -N (i)
rivero	ŝolvi -N	tablo	-um-	vorto
robo	ŝomero	tablojdo	unu	vulpo
rompi -N	soni	tabulo	ungo	vundo
rondo	ŝonĝo	tago	universala	
rosti -N	ŝovaĝa	tamen	universitato	zorgi <i>pri</i>
rozo	ŝpeco	tapiŝo	urbo	zono
		tasko		zumi

## KORESPONDI DEZIRAS

respondgeamikojn en Hungario.

### Albanio

**Sidzit Tusha**, L14 Rrg Arkitet Kasemi P-71/3/42 Tirano

### Aŭstralio

**Yiona Shaw**, 7 Khutsford St, Swanbourne, Perth 6010

### Finnlando

**Hanna Helen**, Viritie 6A, SF-47400 Kausala. 17-jara knabino interesiĝas pri lingvoj, hundoj, ŝatas skribi leterojn kaj legi, kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn pri hundoj. Deziras korespondi tutmonde kun 14-20-jaruloj.

### Irano

**Babek Moarrf**, P.O. Box 121, Ashtiyani R. 21-jara studento, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

### Kroatio

**Cento da lernantoj** de 8 ĝis 20-jaraj ĉiam serĉas korespondantojn tra la tuta mondo; kaj por grupa kaj unuopa korespondado. Kontakto: Marija Belosevic, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb.

### Litovio

**Vilma Janusevičiute**, 5306 Panevizys, Raŝiu 119a. Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj.

### Nederlando

**Jolein de Ruiter**, Pimpernel 56. 1902 JI Castricum. 8-jara knabino deziras havi ko-

### Pollando

**Remigiusz Poltorak**, ul. Lesna 39a. PL-32-078 Trzyciaz. 17-jara knabo interesiĝas pri fremdaj lingvoj, sporto, turismo, muziko. Dez. kor. tm.

**Michal Porzucek**, Panstwowy Dom Dziecka w Winiarach, PL-28-136 Nowy Korczyn.

### Rumanio

**Gergely Erika**, Sintion-Szentjanos, Str. Bocskay 144. R-32724, jud Bihor. 14-jara knabino, interesiĝas pri sporto, matematiko, geografio kaj historio.

### Rusio

**Abidujeva Bajarma**, RUS-671354 Burjatio, Muhor-Sibirskaja regiono, s.Ŝinestuj, ul. Raboĉaja 12. 18-jara knabino kolektas kalendaraĵojn, poŝtmarkojn kaj bildkartojn pri bestoj kaj urboj.

**Mokrovskaja Diana**, Ivanovo, Ŝuja - 155600, ul. General Belov, d 67A, kv. 1. 15-jara knabino deziras korespondi tutmonde, kolektas bildkartojn pri urboj kaj naturo.

**Denis Erjomenko**, Jubilejnaja 33 - 1 - 56, RUS-623520 Suhoj Log. 17-jara knabo, interesiĝas pri sporto, lingvoj, landoj, libroj, kolektas etikedojn de maĉgumoj.

*Ni senpage aperigas korespondpetojn de junuloj ĝis 20-jaraĝaj kaj de instruistoj. Bonvolu skribi ĉion tre klare. Vi rajtas sendi foton de vi mem!*

## Lastmomentaj korespond-petoj

**Komencantaj geesperantistoj:** 36-jara instruistino kun du infanoj: 15-jara filino Zsofi kaj 9-jara filo Viktor deziras korespondi tutmonde pri turismo kaj Esperanto. Szalay Gyorgyi, HU-1119 Budapest, Tetenyi ut. 38/b, Hungario.

**Grupo da 12—15-jaraj gekomencantoj** serĉas leteramikojn en la tuta mondo. Heidrun Lapat, Gymnasium, DE-74219 Möckmühl, Germanio.

**Atentul** Estas tre grave, ke korespondado, precipe klasa, pluiru regule. La lernantoj forte atendas la respondojn, kaj tre seniluziigas se ne revenas eĥo. Se vi aŭ via grupo unufoje eniras korespondan aranĝon, nepre ne neglektu vian devon respondi senprokraste! Se via klaso ne plu kunvenas, aŭ por alia kialo la korespondado ne povas pluir, nepre per almenaŭ kelklinia poŝtkarta mesaĝo informu viajn partnerojn pri tio! Tiel ili povos serĉi aliajn korespondemulojn. En niaj lastatempaj ILEI-kursoj, kelkaj instruistoj rakontis pri malsukcesoj daŭrigi korespondadon kun rezulta seniluziigo de la lernantoj.

# Marimba

## Meksika legendo

Iun tagon juna indiano Birda Plumo iris en la ĝangalon pli profunden ol kutime. Li paŝis gaja kaj bonhumora sed subite haltis mirigita ĉar tuj ĉe si ekaŭdis interparolon. La junulo ĉirkaŭrigardis, sed neniu homo estis videbla. Birda Plumo aŭskultis do atente kaj baldaŭ konvinkigis, ke interparolas ne homoj sed arboj. Jen cedro diris al kverko, ke estintan antaŭvesperon ĝi estis atestanto de tre malgaja evento. Nome kelkaj tristaj indianoj eksidis ĉe la vojo kaj kli-



ninte la kapojn sidis silente kvazaŭ atendante liberecon. Tiam la kverko demandis: ĉu eblas, ke neniu kompatas la malfeliĉajn indianojn? La arboj komencis kune preparoli kion ili mem povus fari por helpi la povrajn homojn kaj plibonigi la sorton de indiĝenoj. Aŭdiĝis voĉo: estas vero, ke ni helpas ilin retenante humidon, liverante lignon por domkonstruo kaj hejtado, sed oni devas doni al ili ankaŭ ion gajigan, kio mildigos ilian kruelan sorton". Tiam ekparolis iu grandaĝa arbo: "karaj fratoj, mi deziras konfidi al vi mian sekreton. Dum tre longa vivo, mi arigadis sub mia ŝelo mirindajn naturmelodiojn kaj nun ili restas tie senutilaj. Mi arigis ĉirpadon de birdoj, lirladon de torentoj, ventoblovon kaj muĝadon de tempestoj. Mia ligno havas animon de ĝangalo kaj tuj mi tion pruvos". En la sama momento eksonis mirinde bela muziko. Kiam la koncerto finiĝis, ravita Birda Plumo revenis hejmen kaj rakontis la travivaĵon al siaj amikoj. Ĉiuj decidis tuj ekiri la ĝangalon por ekvidi la arbon kaj ĝui la muzikon. Sed dume falis nokto kaj oni devis prokrasti la ekmarŝon ĝis la sekvanta mateno.

Je la matenkrepusko Birda Plumo ne atendante la amikojn, sag-rapide ku-

ris al la ĝangalo. Tamen la arbo silentis. Multajn tagojn la junulo pasigis en la ĝangalo kaj ne volis reveni hejmen. Liaj amikoj timis, ke li frenezigiĝis. Fine irititaj la junuloj decidis forhaki la arbon. Ili revenis do hejmen, prenis hakilojn kaj ree ekmarŝis al la ĝangalo. Trovinte la obstinan arbon ili ekfrapis ĝin per la hakileĝoj. Kaj tiam okiazis io neklarigebla, io tiom eksterordinara, ke la junuloj ŝtoniĝis pro miro. Nome, ĉe ĉiu hakilfrapo la arbo sonigis tiel mirinde belan sonon, ke la hakantoj terurigiĝis kaj lasinte la hakilojn forkuris. Tiam proksimiĝis al la arbo Birda Plumo. Li ĉirkaŭprenis ĝin kaj ekploris. La arbo milde eksusuris dirante: "finhaku min, Birda Plumo kaj mian lignon prenu hejmen, ĉar ĝi estas saturita de muziko". La indianoj helpis al Birda Plumo porti la lignon al la vilaĝo kaj la junulo faris el ĝi muzikilon. Tiu, frapata per bastonetoj eligadis mirinde dolĉajn sonojn similajn al la ĉirpado de birdoj. Oni nomis ĝin "marimba" kaj ĝi fariĝis nacia muzikilo de indianoj.

*Zofia Mirska, Pollando*

### La jakohava hundo


Hodiaŭ sur la strato mi vidis grandan hundon kun naz-alta eleganta sinjorino; ĝi ŝtele ĵetis flanken rigardon sur la grundon, sed katenis ĝin severa disciplino.

Ĝi marŝis kun orgojlo, best-moŝto eminenta, kaj sendube havis rason grand-valoran, ĉar tio estis klara, facile evidenta ĝi grand-pompe portis jakon ruĝ-koloran.

Mi algapis ĝin mir-plene, tio estis ja unika, sed vest-arte ĝi kondutis ne modele; respekte mi sufloris per voĉo bon-amika ĉiun vorton ĝi aŭskultis gap-orele.

"Pardonu min, mi petas alt-moŝta ekscelenco, sed vi breĉas etiketon kaj bon-tonon. Jen estas informeto — ruĝiga konfidenco — grand-sinjoroj ĉiam portas pantalonon!"

Ne plu ĝi paŝis brile, la voston ĝi subteris, kaj ĝi rampis kun senglora kapo-pendo; jam krevis la fiero, sin kaŝi ĝi deziris, veaspekta kiel truo-hava bendo.



*Bertram Potts Nov-Zelando.*

## PERANTOJ DE JUNA AMIKO por 1994

Sur paĝo 12 ni donis la bonan novaĵon pri senŝanĝa prezo por Juna amiko, kune kun simpla tabelo de la ĉefaj prez-kategorioj. Nome, niaj abonoj spegulas la malsaman pagi-povon de homoj tra la mondo.

Ĉefaj internaciaj perantoj estas UEA en Nederlando kaj ILEI en Svedio. Ni havas perantojn multloke, kiuj akceptas kotizojn en lokaj valutoj — jen ilia adreso kaj la kotizoj. La unua cifero estas por unuopa jarabono (4 numeroj). La postaj ciferoj inter punkto-komoj estas la po-abona kosto por respektive 2 ĝis 5, 6 ĝis 24 kaj ekde 25 ekzempleroj sendendaj al unu adreso.

**Internacia:** ILEI, B. Andreasson, Södra Rörum, pl. 455, SE-242 94 Hörby.

60; 50; 40; 35 SEK. Pĝk. 147429-5.

**Internacia:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (pĝk. 378964). 16; 12; 10; 8 NLG. Aere ekstereŭrope.

**Migranta:** Jorgos Comte, St. Felix de Rieurtort, F-09120 Varilhes, Francio, aŭ ĉe la biciklo laŭ la enlanda tarifo.

**Argentino:** Argentina Esperanto-Asocio, C.C. 1428, RA-5000 Cordoba. Tarifo: Brazila. Aere.

**Aŭstralio:** AEA-Libroservo, P.O. Box 230, Matraville, NSW 13; 11; 9; 7 AUD. Aere.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg. 100; 75; 60; 50 ATS.

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen kaj Eldonejo Sonorilo, Doornstr. 22, B-2610 Wilrijk. 250; 210; 170; 130 BEF.

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, BR-70084 Brasília (DF). 10; 8; 7; 5 NLG. Pri enlanda tarifo decidias BEL. Aere.

**Britio:** P. Hewitt, 26 Highfield Rd, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. 5; 4; 3; 2,50 GBP.

**Bulgario:** Lilja Koleva, bulv. Cv. Radojkov 10 bl. 2, vh B, ap. 34, BG-1504 Sofia. La ekvivalento je la pago-tempo de 350 HUF, 6 DEM aŭ 4 USD. (350; 300; 250; 200 HUF)

**Ĉeĥio:** ĈEA, Jiřska 10, 110 01 Praha. 75; 60; 50; 40 CKR. aŭ kiel Kroatio.

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curico; ĉekkonto 425-000-74391 ĉe Banco del Estredo de Chile. Abonoj kiel Brazilo. Aere.

**Ĉinio:** Zhang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong. 12; 10; 8; 6 CNJ.

**Estonio:** Eva Otse, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn. Tarifo kiel Bulgario.

**Francio:** UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris. 45; 40; 35; 30 FRF.

**Germanio:** Esperanto-Centro Paderborn, Grünigerstr. 5, D-W4790 Paderborn, kaj J. Pachter, Untere Volkwinhalde 9, DE-72488 Sigmaringen. 14; 11; 9; 7 DEM. Orienta: Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-O-7010 Leipzig (konto 5602-39-22320). 10; 8; 7; 5 DEM (tarifo nur por loĝantoj de orienta Germanio).

**Hispanio:** Francisco M. Munoz Garre, Camino del Carcanox s/n, E-30580 Alquerias (Murcia). 800; 600; 500; 400 ESP.

**Hungario:** ILEI, M. Kovács, Ady E. u. 23, H-1221 Budapest. 200; 160; 140; 100 HUF. Konto: OTP Bp XXII ker, n-ro 546-006891-8. Donacabonoj por eksterlandanoj 350; 300; 250; 200 HUF. Aŭ vizitu la klubejon 'Esperejo' lunde aŭ merkred-vespere. Ne plu uzu HELIRI! Al hungaraj abonantoj ni sendos kun JA93/3 aŭ 93/4 pagilon por re-abono.

**Israelo:** Kontakto E-Ligo en Israelo, P.O.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv. Brazila tarifo. Aere.

**Italio:** Carla de Lorenzi, Via Boston 65, IT-10137 Torino (konto 33868100). 10000; 8000; 7000. 5500 ITL.

**Japanio:** H.R. MacGill, 1563-2 Okuyama, Inasa-gun, Sizuoka-ken, 431-23. 1000; 800; 700; 500 JPY. Aere.

**Jugoslavio:** Vojnic Blaško, Ferenci Ibolje 31, YU-24000 Subotica. Tarifo, v.idu Kroatio.

**Kanado:** Merle Haltrecht-Matte, 7083 rue Notre Dame, Orléans, Ontario, K1C 1J1. 10; 8; 7; 5 CND. Aere.

**Koreio:** Librejo GAJA, s-ro Lee Jung-Kee, C.P.O. Kesto 3047, Seoul KR-100-630; tel. (822) 585-8841. Tarifo kiel Brazilo. Aere.



**Kroatio:** Kroatia Esperantista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb. Ekvalento en pago-dato de 250 HUF, 5 DEM aŭ 3,50 USD. (250; 210; 180, 140 HUF).

**Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apt. postal 2108, La Habana 2. Tarifo kiel Bulgario. Aere.

**Latvio kaj Litovio:** LEA, ab/k 167, LIT-3000 Kaunas. Tarifo kiel Bulgario.

**Norvegio:** Eldonejo de NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5. 55; 45; 35; 30 NOK.

**Nov-Zelando:** Kontakto s-inon G. Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1. 13, 11, 9, 7 NZD.

**Pollando:** Silezia E-Asocio, Str. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw; J. Parzyszek, ul. Piasta 52/21, PL-15-044 Bialystok; Kastora Klubo, ul. Pulawska 3-11, PL-02-515 Warszawa; PWM 'NE-PO', Maciej Wnuk, Skrytka 105, PL-01-865 Warszawa; Aleksandro Kaminski, Lanowa 20a, m87, bl. 41, PL-91-103 Lodz. Tarifo kiel Bulgario.

**Rumanio:** Vasile Albu, Str. Eroilor 9, R-2400 Sibiu. 300; 260; 230 kaj 200 RUL.

**Slovakio:** SEA, Sobotske nam 6, 058 01 Poprad. 80; 65; 50; 40 SKR.

**Rusio:** REU, Moskvo. Tarifo kiel Bulgario.

**Svedio:** Lisbet Andreasson, Södra Rörum, pl. 455, SE-242 94 Hörby. 60; 50; 40; 35 SEK. Pĝk. 147429-5.

**Ukrainio:** Esperanto Centro, P.O. Kesto 539/1 UKR-252200 Kiev. Tarifo kiel Kroatio.

**Usono:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. 9; 8; 7; 5 USD. Aere.

**Venezuelo:** J.E. Bachrich, Apdo 70782, Caracas 1071 A. Laŭ la brazila tarifo. Aere.

Por pluraj landoj ni ne fiksas kotizon en la enlanda valuto. Perantoj tie devas transformi la kotizo-sumon al konvertebla valuto aŭ hungaraj forintoj. ILEI povas akcepti pagon en servoj aŭ varoj nur post anticipa interkonsento.

### Enketilo pri instruado

Kutime en nia tria numero ni aperigas respondilon, per kiu lernejoj klasoj povas anonci sin kaj akiri kontaktojn kun aliaj klasoj. Tio ne aperas nun, ĉar ILEI klopodas trovi iun kun komputilo por administri datum-bazon de klasoj kaj instruado, kaj ni traktas kun usonano, kiu povus plenumi tiun funkcion. Sed se via klaso volas kontaktojn, anoncu viajn dezirojn — landoj, aĝo, interesoj, speco de interŝanĝo, kaj ni faros alvokon por vi!

Ni forte pardonpetas pro la granda malfruo de ĉi tiu numero. Ni promesas, ke ni serĉadas manierojn trovi pli solidan bazon por la pretigo kaj administrado de la revuo. Kaj ni tuj eklaboras pri la jarfina numero!

Krucenigma konkurso el la lasta numero: Gajnis Georgo Csüllög, Veszto, Hungario kaj Sara Della Bella el Livorno, Italio. Gratulojn kaj premiojn ni sendas al vi!

La plej ofta...

# Eventoj

Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj

Petu senpagan provekzempleron:

EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario



## Nekonata patro de mondokonataj filoj


Se vi rigardas lian portreton, vi verŝajne ne ekkonas lin. Sed rigardante la alian bildon; vi sendube tuj scias, pri kiu temas. Jes, temas pri Wilhelm Busch, fakte unu el la mondfamaj homoj. Liaj bildorakontoj estas tradukitaj ofte en aliajn lingvojn, eĉ en dialektojn. Fine de sia vivo en la jaro 1908 li povis legi siajn librojn en 11 diversaj lingvoj. En la jaro 1990 ekzistis jam pli ol 190 tradukoj de lia plej fama libreto *Max und Moritz*. Preskaŭ en ĉiu germana kaj en multegaj eksterlandaj familioj troviĝas libro de li. Kvankam preskaŭ ĉiu ko-

nas lian nomon kaj legis liajn librojn, la plej multaj personoj nur malmulton scias pri liaj persono kaj vivo. Ĉu ankaŭ vi?

Nu, kiu estis li? Wilhelm Busch naskiĝis la 15an de aprilo en la jaro 1832 en la vilaĝo Wiedensahl en norda Germanujo. Li havis ses pli junajn gefratojn. Pri siaj gepatroj li skribis en biografio: 'Mia patro estis butikisto gaja kaj laborema; mia patrino, trankvila kaj pia, diligente laboris en la domo kaj la ĝardeno. Ambaŭ vivis en harmonio kaj estis tiom hejmeme, ke pasis pli ol 20 jaroj sen unufoje komune forlasi la domon.'

Wilhelm Busch mem ne povis pasigi tiom da jaroj hejme. Jam en la naŭa jaro de lia vivo la gepatroj donis lin al la onklo, pastoro Georg Kleine, al Ebergotzen apud Gottingen. La onklo, klera kaj multtalenta homo, nun respondecis pri la edukado kaj bonfarto de la knabo. Wilhelm skribis pri li: 'Li estas trankvila naturobservanto kaj tre milda; nur unu fojon mi ricevis batojn, kvankam pli ofte ili estus necesaj...' Lia abelobredado multe interesis la junulon. Li bone observis tiujn bestetojn kaj ofte desegnis ilin. Lia onklo ankaŭ atentigis lin pri en- kaj eksterlandaj poetoj. Tiamaniere li frue akiris senton pri ĝusta ritmo kaj metriko. Nur post tri jaroj li la unuan fojon povis reveni hejmen kaj vidi sian familion. Entute sep jarojn li pasigis ĉe sia onklo.

Laŭ la volo de la patro li



poste devis eklerni ĝustan mention, nome fariĝi maŝiningenero. Aŭtune 1847 li komencis la studadon en la politeknika altlernejo en Hannover. Kvankam li ege klopodis esti bona studento, li tamen jam sentis, ke tiu profesio ne povas esti lia vivocelo. La arto pli allogis lin. Liaj kajeroj estis ĝisranda plenaj de desegnaĵoj kaj karikaturaj pri liaj instruistoj.

En la jaro 1851 li kontraŭ la volo de la patro decidis forlasi la altlernejon kaj komencis studi desegnoarton en la akademio en Dusseldorf. Sed ankaŭ tie ne plaĉis al li kaj jam en 1852 li ŝanĝis la studolokon al Antwerpen en Belgio. Tie li entuziasmiĝis pri la nederlanda pentroarto kaj — komparante la sian kun ĝi — samtempe dubis pri siaj personaj artokapabloj. Kritikema kontraŭ si mem li neniiĝis multajn siajn bildojn kaj signis nur tiujn, kiujn li opiniis bonaj. Post nur unu jaro, li skribis al la gepatroj: 'Mi pensas, ke mi estas veninta al la punkto, kie mi finis miajn antaŭstudojn kaj pro tio mi esperas, ke mi baldaŭ povas esti inter vi por daŭrigi miajn studojn laŭ la naturo'.

Denove hejme, Wilhelm multe legis fabelojn, ofte vizitis la onklon kaj okupiĝis pri ties abeloj, ludis en amatora teatro kaj daŭre desegnis - ĉio ĉi ne plaĉis al la patro, ĉar per tio oni ne povis perlabori monon. Nur post persvadoj de la patrino kaj de la onklo, la ĉagrenita patro estis preta lastan fojon elspezi monon por daŭrigi la studojn de la filo, nun en la akademio pri arto en Munkeno. Tio okazis en 1854. Tie la eldonisto Caspar Braun malkovris en Busch talentan karikaturiston kaj proponis al li desegnan kunlaboron en sia gazeto *Fliegende Blätter*/Flugantaj Folioj. Jen Wilhelm Busch unufoje en sia vivo enspezis monon per siaj artaĵoj. Baldaŭ li ne nur desegnis, sed aldonis al siaj desegnaĵoj memfaritan tekston. Tamen, la unuaj bildhistorioj tute ne vendiĝis. Pro tio li eĉ donace volis doni al iu eldonisto la historietojn pri *Max und Moritz*, sed tiu eĉ senkoste ne volis akcepti ilin. Do, Busch en 1865 proponis ilin denove al Caspar Braun. Tiu nun, jam iom pli sperta kaj kun pli da eldonista fantazio, ekkonis la valoron de la bildrakonto kaj akceptis ĝin kontraŭ unufoja pago de 1000 guldenoj. Li bone investis — la verko fariĝis la plej granda sukceso de la eldonejo. Busch per ĝi ja famiĝis, sed pro la

DEUTSCHE BUNDESPOST

125 Jahre Max und Moritz



60  
+30

125 Jahre Max und Moritz




70  
+30


FÜR DIE JUGEND 1990

kontrakto pri unufoja pago ĉiuj rajtoj kaj enspezoj restis ĉe la eldonisto. Ekde tiam ankaŭ liaj aliaj bildhistorioj bone vendiĝis, profite nun ankaŭ al la aŭtoro.

La privata vivo de Busch estis nespektakla. Foje liaj inventoj spegulas trajtojn el la propra vivo. Ĉar li estis fumanto, kelkaj el liaj figuroj prezentiĝas kiel gajaj kaj ĝuantaj fumantoj. Neniam li edziĝis, kvankam en liaj rakontoj ofte temas pri scenoj el la geedza vivo. Sed plej ofte li moke, ironie, eĉ sarkasme komentis la familian kunvivadon. Precipe li ridindigis tiajn edzojn, en kies domoj regas la edzino. Tamen, la rilatoj kaj la leterkontaktoj al diversaj virinoj estis amikecaj kaj parte daŭris ĝis lia vivofino.



FÜR DIE JUGEND 1990




FÜR DIE JUGEND 1990

Post plurjara vivo en grandaj urboj kiel Hanovro, Dusseldorf Antverpeno, Munkeno kaj Frankfurto li en 1872 revenis al sia trankvila naskiĝloko Wiedensahl. Tie li verkis multajn poemojn, skribis sian biografion kaj multe pentris laŭ la naturo. Malgraŭ lia kvieta ĉirkaŭaĵo, liaj satiroj dum la tempo ĉiam fariĝis pli akraj. En 1898 li translokiĝis kune kun sia fratino al sia nevo, pastoro Otto Noldeke en Mechtshäusen/Harz. Tie li retireme pasigis sian vivovesperon. La 9an de januaro 1908 Wilhelm Busch, nun mondfama aŭtoro, mortis pro kormalforto.

Liaj bildrakontoj certe ankoraŭ longatempe ĝojigos infanojn kaj plenkreskulojn. Eĉ vi kiel Esperantisto povas ĝui parton el lia verkaro. La libro *Maks kaj Morits* komplete ekzistas en Esperanto, eĉ en 4 versioj. Se vi ankoraŭ ne posedas ĝin, mi nepre povas rekomendi la legadon!

ROSSI ER Rita

Rekomendinda traduko:  
Maks kaj Morits  
trad. Rudolf Fischer  
F.Coppenrath-Verlag, Munster 1985 (kolora)



## Novaj libroj ĉe ILEI

ILEI, kiu eldonas la revuon *Juna amiko*, ankaŭ eldonas kelkajn librojn kaj aliajn ĝi interŝanĝas, ĉefe kontraŭ abonoj al *Juna amiko* mem. El tiuj ĝi formis modestan libroservon, kiu nun raportas al vi kaj invitas viajn mendojn:

- La unua nova libro estas malnova libro, kiun oni renovigis. Nome, la du mil ekzempleroj de unua kajero *Tendaraj tagoj I* forvendiĝis kaj venis la tempo represi ĝin. Tion la aŭtoro prizorgis, sed kaptis la okazon rearanĝi kelkajn paĝojn. Parte, ĉar okazis ŝanĝoj en la mondo pri landnomoj intertempe. Ni kaptis la okazon aldoni koloran presadon sur kvar en tiuj paĝoj, por ke ili estu pli allogaj. Li verkis kaj preparis kvar tute novajn paĝojn (ankaŭ kun aldona koloro), por pli klare prezenti tre bazan kaj gravan temon en Esperanto, la du specojn de verboj, la unu-ligajn kaj du-ligajn. Kiu ekde nun aĉetos de ILEI aŭ UEA ricevos la novan eldonon.



Spite la kvar ekstrajn paĝojn kaj kolorojn, la prezo ĉe UEA restas sama: 12.00 gld. (kun triona rabato ekde 3 ekz.). ILEI ofertas ĝin je sama prezo, kun rabato nur ekde 5 ekz. sed ĉe ILEI la surfacaj sendokostoj estas inkluzivitaj. Por reform-eŭropanoj: 110 kaj 90 HUF.

- Aperis nova gvidlibro por instruistoj *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* de mag. Irena Szanser. Ĝi havas tri sekciojn. La unua prezentas la historion de la instru-arto, la dua kiel krei lecionplanojn, kaj kiel instrui la diversajn aspektojn de la lingvo, la lasta, psikologiajn faktorojn kiuj influas la lingvo-lernadon. Detala recenzo aperos en IPR kaj aliaj revuoj. Eblas ĝin mendi ĉu de UEA, ĉu de ILEI, ĉu de aliaj libroservoj. Prezo ĉe UEA estas 24 NLG (kun sezona rabato ekde 3 ekz.), same ĉe ILEI sed tio inkluzivas la surfacajn sendokostojn, kaj ĝi donos trionan rabaton ekde 8 ekzempleroj. Kosto ĉe ILEI por reform-Eŭropanoj: 600 HUF.

- *Ĉu vi aŭdis, ke...* estas titolo de nova verko de eldonejo Sabatejo. Ĝi prezentas ekzercojn pri aŭskulta kompreno per libreto kaj sonkaseto. ILEI rekomendas ĝin por uzo en kursoj aŭ por ekzamena preparado. Prefere mendu ĝin de UEA (24 NLG, sezona rabato ekde 3 ekz.), aŭ rekte de la aŭtoro: S-ino Katalin Smidéliusz, Apaczaí Setány 10, HU-9700 Szombathely.

## MENDILO AL ILEI

Eldondu, fotokopiu aŭ transskribu al sendu al: ILEI, Eső u. 7 III, H-1034 Budapeŝt, antaŭ la 15a de decembro, kiam altiĝos denove la poŝtaj tarifoj kaj eventuale niaj prezoj.

<i>Kvanto</i>	<i>Titolo</i>	<i>SUMO</i>
_____	Tendaraj tagoj 1 (nova) po 12.00 NLG aŭ 110 HUF	_____
_____	Tendaraj tagoj 1 (ekde 5 ekz) po 8.00 NLG/90 HUF	_____
_____	Tendaraj tagoj 2 po 15.00 NLG aŭ 140 HUF	_____
_____	Tendaraj tagoj 2 (ekde 5 ekz) po 8.00 NLG/90 HUF	_____
_____	Teorio kaj praktiko...(Szanser) 24.00 NLG aŭ 600 HUF	_____
_____	Teorio kaj praktiko... (ekde 3 ekz) po 20 NLG/500 HUF	_____
_____	Teorio kaj praktiko (ekde 8 ekz) po 16 NLG/400 HUF	_____
_____	Legendoj pri SEJM, po 8 GLD/90 HUF (limigita stoko)	_____
_____	Impeto '91 (kolekto da artikoloj), 8 GLD/90 HUF	_____
_____	Danĝera lingvo (Lins; Moskva eldono) 36 GLD/600 HUF	_____
_____	Membreco ILEI 1994 (sensekciaj landoj): 20 GLD/250 HUF	_____
_____	Membreco ILEI 1994 (sekciaj landoj): 25 GLD/ 300 HUF	_____

Nomo: . . . . .

Adreso: . . . . .

. . . . .

Subskribo: \_\_\_\_\_ Loko: \_\_\_\_\_ Dato: \_\_\_\_\_

Bv. sendi kun via mendo pruvon pri la pago. Nur antaŭpagitajn mendojn ni plenumos. La prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn.

Eblas pagi al UEA (prefere per ilia interna ĝirilo) por la konto **Ilek-a** (nepre indiku tion kaj la vorton 'libromendo' aŭ 'membreco'). Se vi pagas pro *Juna amiko* uzu ĝian konton: **juna-I**.

Eblas pagi al la kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio: poŝtĝironto 682117-7 (Stokholmo). Pro altaj banko-kostoj, evitu bank-ĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Eŭroĉeko plej bonas. Se vi pagos en svedaj kronoj, kalkulu la kvaroblon de la guldenaj prezoj.

Loĝantoj de reform-eŭropo rajtas pagi forinte al la hungara ILEI-sekcio: M. Kovács, Ady Endre u. 23-25, H-1221 Budapeŝt; poŝtĝironto-numero: OTP Bp. XXII ker, n-ro 546-006891-8. Ni sendos al hungaraj abonantoj pagilon kun ĉi tiu aŭ la venonta numero de *Juna amiko*.

Eblas aĉeti en la budapeŝta klubejo 'Esperejo' (Sandor Peterfy u. 23, apud stacidomo Keleti) lunde kaj merkrede vespere, kun kelkfoje pli modera prezo pro forŝalo de aŝranko.





Ne pagu libromendojn aŭ membrecojn al perantoj de *Juna amiko*, krom se ili specife akceptos tion. Membrecon en ILEI akceptas ne nur la kasisto sed ankaŭ landaj sekcioj en tri-deko da landoj, la kasisto informos vin pri tio.

## Kiel konstrui verdan stelon

Jen unu el la aktivecoj preparitaj en infana semajnfino en Kolĉestro, Anglio en marto 1993 kaj prezentita en la gazeto de la aranĝo.

Vi bezonas verdan ŝnureton kaj nigran kvinangulon el solida kartono kun fendetoj aŭ eĉ el ligno kun najletoj anstataŭ fendetoj.

- 1 Faru grandan nodon ĉe la fino de la ŝnuro.
- 2 Fiksu la ŝnureton en fendeto numero 1.
- 3 Vindu la ŝnureton ĉirkaŭ la formon, uzante la fendetojn laŭnumere (1, 2, 3, ktp.) kaj fendon A, por fari la unuan pinton de la stelo.
- 4 Daŭrigu uzante la fendetojn de najbara latero kaj fendoj B.
- 5 Daŭrigu kun fendoj C, D kaj E ĝis la fino. Laste, bone alfiksu la finon de la ŝnuro. Jen verda stelo!




# La somero de Go-go kaj kompanio

de Martin Weichert

Saluton, ĉiuj! Ĉu vi kunportis belajn suvenbrojn el viaj ferioj?


Mi KUNPORTIS  
KUBON EL KUBO

Mi AKIRIS  
MALTON EN MALTO



Mi TROVIS  
GRENADON EN GRENADO


Mi VENIGIS  
BUTANON EL BUTANO



Mi KAPTIS  
ANGILON EN ANGLIO

...Kaj Mi  
MONAKON EN MONAKO

SED MI  
HEJMEN  
PORTIS...



...NUR  
KATARON  
EL KATARO!